

TIDA Syuntarô

Kyoto University, Japanio / Japan

Kial multas adjektivoj en Esperanto? Komparo kun la korea, la japana, Dom, Tokpisino kaj aliaj lingvoj

Resumo: Estas ĝenerale akceptite, ke iuj lingvoj havas grandan klason de adjektivoj dum aliaj kontentigas sin per malmultaj – laŭokaze neniom – en la sama vortospeco. En ĉi tiu artikolo, mi provas montri la proprajojn de adjektivoj en Esperanto, kiuj kontribuas al la abundeco de adjektivaj vortoj, pere de komparo kun la korea, la japana, Dom, Tokpisino kaj aliaj lingvoj. Diskutataj estas i.a.: (i) diferencoj inter verbecaj adjektivoj kaj substantivecaj adjektivoj; (ii) rekta determinado, kiuj ne estas propraĵo de adjektivoj en multaj lingvoj; (iii) posedaj pronomoj, kiuj estas adjektivaj en Esperanto, sed ne en aliaj lingvoj; kaj (iv) rilataj adjektivoj, kiuj estas tute fremdaj al la plejmulto da lingvoj. Esperanto produktive derivas diversajn adjektivojn el substantivoj kaj verboj, sed multaj lingvoj utiligas aliajn strategiojn por esprimi tiujn signifojn. Fine, mi argumentas, ke la ekzisto de amaso da adjektivoj kaj aparte de rilataj adjektivoj, estas karakteriza trajto de Esperanto, kaj ke kiel sugestite rilate adpoziciojn (Tida 2008), Esperanto klare heredis tiun ĉi econ el eŭropaj lingvoj.

Ŝlosilvortoj: Esperanto; Adjektivoj; La korea lingvo; La japana lingvo; Novgvineo.

1 Enkonduko

Vortospeco¹ estas gramatika klaso de vortoj en certa lingvo. Por distingi diversajn vortospecojn, ni observas gramatikajn kondutojn de vortoj en la koncerna lingvo. Estas ĝenerale akceptite, ke la aro de vortospecoj en iu lingvo ne necese respondas al tiu de alia lingvo, kaj la grandeco de ĉiu vortospeco ege varias de lingvo al lingvo. Plejmulto de lingvistoj konsentas, ke troviĝas en ĉiuj lingvoj distingo inter substantivoj kaj verboj kiom ajn malfacile estas trovi kriteriojn por identigi gramatikajn diferencojn inter ili en certa lingvo (vidu i.a. Schachter kaj Shopen 2007: 5; Dixon 2010: 37–38; aldone al la ĉi-subaj referencoj). Ekzemple, kelkaj lingvistoj iam argumentis, ke ne ekzistas distingo inter substantivoj kaj verboj aŭ iaj ajn vortospecoj en la munda lingvo (Hoffman 1903: xvii–xxi; Hengeveld k.a. 2004). Tamen Evans

1 “Vortospeco” laŭ la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (PIV). Alia esprimo kutime uzata estas “parolelemento”.

kaj Osada (2005) montris, ke lingvo sen vortospecoj estas mito. Nuntempe tute ne ĉesas tiu debato tiel ke unu el la aŭtoroj de la supremenciita artikolo diras aliloke, ke “ ankoraŭ ne donita estas la fina respondo al la demando ĉu ĉiuj lingvoj almenaŭ distingas substantivojn kaj verbojn, sed certe ekzistas lingvoj sen prepozicioj, adjektivoj, artikoloj, aŭ adverboj” (Evans 2010: 46; mia traduko).

Antaŭ ol diskuti pri adjektivoj, mi volas adopti la opinion, ke subjekto kaj predikato estas du bazaj kaj universalaj sintaksaj elementoj en frazo (Boas 1938: 133) kaj ankaŭ, mi volas supozi, ke la distingo inter substantivoj kaj verboj, kiu estas difinebla kaj sintakse kaj semantike, estas universala kiel plejmulto de lingvistoj – eĉ la plej skeptikaj – supozas (Sapir 1921: 125-126; Vendryes 1921: 136-139). Komparo de malpli baza kategorio de adjektivoj en diversaj lingvoj eblas nur surbaze de sistemo kun substantivoj kaj verboj kiel ĝenerala arkitekturo de gramatiko. Kiel bone konate, tipaj substantivoj povas stari kiel subjektoj sintakse, kaj ili semantike signifas iajn objektojn, dum tipaj verboj povas stari kiel predikatoj signifante agojn. Tio ne signifas, ke ĉiu substantivo de iu lingvo devas signifi objekton (ekz. *ago* en Esperanto). Ankaŭ iuj verboj en iu lingvo povas ne signifi agon (ekzemple *inkluzivi* en Esperanto). Universalaj kategorioj de substantivoj kaj verboj estas prototipaj kategorioj, kies kernaj membroj prezentas ĉiajn tipajn sintaksajn kaj semantikajn karakterojn. Ne malpli grave, substantivoj kaj verboj devas konsistigi vortospecojn en la senco, ke ili konsistigas gramatikajn klasojn en koncerna lingvo. Kriterioj de vortospececo estas lingvo-specifaj. Ekzemple, iuj vortoj en Esperanto havas tipan finaĵon *-o*, kaj “deklinaciigās” aŭ ŝanĝas siajn formojn laŭ nombro kaj kazo; tial ili formas morfologian klason. Tipaj membroj de ĉi tiu speco semantike reprezentas iajn objektojn kaj sintakse povas stari kiel subjekto; tial la vortospeco konsideriĝas kiel substantiva.

Esperanto havas vortospecon, kies membroj deklinaciigās laŭ nombro kaj kazo samkiel substantivoj, utiligas normale helpon de kopulo kiel *esti* por formi predikaton en la sama maniero ankoraŭfoje kiel substantivoj, sed diferencas de substantivoj per tio, ke ili povas rekte determini substantivon kaj havas tipan “finaĵon” *-a*. Kiel nomi ĉi tiun vortospecon? La propono de Dixon (1977, 2004) estas klara kaj fidinda por identigi vortospecojn, aparte adjektivan: la etikedo aŭ rubriko de ĉiu vortospeco decidiĝas laŭ tipa semantika enhavo de kernaj membroj. Oni nomas la koncernajn vortojn “adjektivoj” ĉar kernaj membroj de ĉi tiu vortospeco inkluzivas vortojn kiel *granda, nova, bona, nigra, mola, rapida, saĝa*, ktp. Esperanto, do, havas adjektivon kiel vortospecon, kaj tiuj adjektivoj estas substantivecaj. Fakte adjektivoj en Esperanto estas tiel multaj, ke la abundeco mem en la koncerna vortospeco karakterizas la lingvon ne senkiale. La lingvoj, kiujn la aŭtoro de ĉi tiu artikolo rekte konas, havas multe malpli da adjektivoj, kaj ŝajnas dece, ke ni komencu rigardi la situacion en ili por klarigi kia estas Esperanto.

2 Adjektivoj en kvar lingvoj

2.1 La korea

La korea lingvo havas vortospecon, kies membroj “konjugaciiĝas” aŭ ŝanĝas siajn formojn laŭ tempo, respekto (direktita al la subjekto), ĝentileco kaj formaleco (direktitaj al la alparolato), kaj modoj (deklara, demanda, subpropozicia) plejparte samkiel verboj sed kun etaj proprajoj, kiujn verboj ne havas. Formoj por diversaj subpropozicioj inkluzivas epitetan formon. La kernaj membroj de ĉi tiu vortospeco inkluzivas vortojn kiel *khu-ta*² “granda”, *saylop-ta* “nova”, *coh-ta* “bona”, *kem-ta* “nigra”, *putulep-ta* “mola”, kaj *ttokttokha-ta* “saĝa”, kaj ilia semantiko kondukas nin nomi ilin adjektivoj. Ĉi-subaj ekzemploj montras kiom similaj estas formoj de la verbo *tal-ta* “pendigi” kaj de la adjektivo *tal-ta* “esti dolĉa”, kies radikaloj estas homofonaj kaj en kies paradigmoj multaj formoj restas homofonaj (1b–d).

- | | | | | |
|-----|----|-------------------------------|---------------------|--------------------------|
| (1) | a. | <i>ta-nta</i> | <i>tal-ta</i> | [korea] |
| | | pendigi-PREZ.DEK ³ | esti.dolĉa-DEK | |
| | | “pendigas” | “estas dolĉa” | |
| | b. | <i>tal-ass-ta</i> | <i>tal-ass-ta</i> | [korea] |
| | | pendigi-PRET-DEK | esti.dolĉa-PRET-DEK | |
| | | “pendigis” | “estis dolĉa” | |
| | c. | <i>ta-pnita</i> | <i>ta-pnita</i> | [korea] |
| | | pendigi-FRM.DEK | esti.dolĉa-FRM.DEK | |
| | | “pendigas” | “estas dolĉa” | (ambaŭ en formala stilo) |
| | ĉ. | <i>ta-pnikka</i> | <i>ta-pnikka</i> | [korea] |
| | | pendigi-FRM.DMD | esti.dolĉa-FRM.DMD | |
| | | “ĉu pendigas?” | “ĉu estas dolĉa?” | (ambaŭ en formala stilo) |
| | d. | <i>tal-myen</i> | <i>tal-myen</i> | [korea] |
| | | pendigi-KOND | esti.dolĉa-KOND | |
| | | “se pendigas” | “se estas dolĉa” | |

Adjektivoj en la korea estas ege verbecaj, kaj inter adjektivoj kaj verboj troviĝas nur malmulte da diferencoj. Ekzemple (1a) ĉi-supre montras diferencon ĉe la finaĵo por la deklara formo: la alomorfo *-nta*, kiu estas eksplicite markita por prezenceco, sekvas verban radikalon kaj la nemarkita alomorfo *-ta*, adjektivan. Krome, al adjektivoj mankas volitiva formo (2a) kaj imperativa formo de verboj havas saman formon kiel ekkria formo de adjektivoj kun la samforma finaĵo (2b).

2 Koreaj ekzemploj en ĉi tiu artikolo sekvas la Yale-transskribon.

3 Listo de mallongigoj troviĝas fine de la artikolo.

substantivon⁵. Vidu Shagal (2017) por la propono, ke la nocio de participo en ĝenerala lingvistiko devas ne esti ligita al la koncepto de adjektivo. Inter aliaj lingvoj kun distingo inter adjektivoj kaj participoj, la burjata estas plene kaj klare montrita kiel tia (Yamakoshi 2013). En Esperanto, la sintaksa epiteteco estas markita per adjektiva formo, kaj la adjektiva formo de participoj probable estas la ĉefa formo de participoj en Esperanto (Tida 2022). Dume, en la korea, la sintaksa epiteteco de adjektivoj estas markita per epiteta (aŭ partcipa) formo, kiu ne estas ĉefa formo.⁶

La korea estas sufiĉe riĉa je adjektivoj (Sohn 2004). Ĉi tiu vortospeco inkluzivas derivaĵojn kaj vortojn de pluraj devenoj: propraj, ĉindevenaj, angla-devenaj kaj aliaj, kaj certe la nombro de koreaj adjektivoj ege superas tiun de japanaj, pri kiuj ni diskutos tuj. Tamen, la lingvo certe havas pli malgrandan provizon de adjektivaj vortoj ol Esperanto. Kompreneble, mi ne parolas pri la esprimpovo de la lingvo, sed pri aparteno de vortoj al vortospacoj.

Antaŭ ol mi montru sisteman mankon de iuspecaj adjektivoj en la posta duono de la artikolo, ekzamenetu kelkajn ne-adjektivajn tradukojn por esperantaj adjektivoj, el esperanto-koreaj vortaroj. Multaj esprimoj el la ĉi-subaj estas substantivoj uzataj kun la genitiva partikulo (4), kaj aliaj estas epiteta formo de ne-adjektivaj predikatoj (5).

(4) a. lasta:

| | | | |
|-------------------|-------------------|-------------------|---------|
| <i>macimak=uy</i> | <i>choyhwu=uy</i> | <i>choykun=uy</i> | [korea] |
| fino=GEN | fino=GEN | lasta.tempo=GEN | |
| “de fino” | “de fino” | “de lasta tempo” | |

b. vera:

| | | | |
|------------------|------------------|-----------------|---------|
| <i>cinsil=uy</i> | <i>cincca=uy</i> | <i>sasil=uy</i> | [korea] |
| vero=GEN | vero=GEN | fakto=GEN | |
| “de vero” | “de vero” | “de fakto” | |

5 Ankaŭ notinde estas, ke la korea epiteta formo de verboj kaj adjektivoj havas nenian orientiĝon dum esperantaj participoj en adjektiva formo havas orientiĝon laŭ voĉo: aktiva participo estas orientita al sia subjekto kaj pasiva participo al sia objekto. En (3) la vorto *kes* “afero”, kiun la epiteta formo de *tal-ta* “pendigi” determinas, povas esti objekto de la verbo aŭ eksterpropozicia elemento. La epiteta formo povas determini ankaŭ sian subjekton (i) kaj elementon, kiu ne estas rekta komplemento (ii).

| | | | | |
|----------------------------------|-------------------------------|-------------------------|-------------|---------|
| (i) <i>a-nun</i> | <i>salam</i> | | | [korea] |
| scii-prez.epit | homo | | | |
| “la homo, kiu scias” | “la homo, kiun (mi/iu) scias” | | | |
| (ii) <i>mek-nun</i> | <i>yang</i> | <i>cek-un</i> | <i>yang</i> | [korea] |
| manĝi-prez.epit | kvanto | esti.malmulta-prez.epit | kvanto | |
| “la kvanto, kiun (mi/iu) manĝas” | “malgranda kvanto” | | | |

6 Mi evitas ĉi tie trakti la verbajn formojn kun adverba funkcio, kiujn la okcidenta tradicio de gramatiko ofte nomas participoj (Haspelmath 1994), ĉar la diskuto estas jam sufiĉe malsimpla.

| | | | |
|----|-------------------|----------------------|----------|
| b. | <i>ta'be-ta</i> | <i>o'oki-kaQta</i> | [japana] |
| | manĝi-PRET.DEK | esti.granda-PRET.DEK | |
| | “manĝis” | “estis granda” | |
| c. | <i>tabe're-ba</i> | <i>o'oki-kereba</i> | [japana] |
| | manĝi-KOND | esti.granda-KOND | |
| | “se manĝas” | “se estas granda” | |

La ĉi-supraj japanaj adjektivoj kaj verboj ŝanĝas siajn formojn laŭ samaj gramatikaj kategorioj kiel la koreaj respondaj vortoj, sed la forma paralelo de adjektivoj kaj verboj en la japana ne estas tiel evidenta kiel en la korea. Ankaŭ, la japana kaj la korea diferencas per tio, ke en la japana verboj kaj adjektivoj ne havas apartan formon por epiteta funkcio. La deklara formo kaj de verboj kaj de adjektivoj povas rekte determini substantivojn, kaj en la ne-preterita formo (7a) kaj en la preterita formo (7b).

| | | | | | | |
|-----|----|-----------------|--------------------------|----------------------|-------------|----------|
| (7) | a. | <i>tabe'ru</i> | <i>hito</i> | <i>ooki'i</i> | <i>hito</i> | [japana] |
| | | manĝi.DEK | homo | esti.granda.DEK | homo | |
| | | “manĝanta homo” | “granda homo” | | | |
| | b. | <i>ta'be-ta</i> | <i>hito</i> | <i>o'oki-kaQta</i> | <i>hito</i> | [japana] |
| | | manĝi-PRET.DEK | homo | esti.granda-PRET.DEK | homo | |
| | | “manĝinta homo” | “homo, kiu estis granda” | | | |

Kvankam adjektivoj en la japana estas iom verbecaj en tio ke adjektivoj kaj verboj konjugaciigās laŭ samaj gramatikaj kategorioj almenaŭ parte, ĉi-supraj ekzemploj sufiĉe montras, ke verboj kaj adjektivoj diferencas per alomorfoj de la finaĵo, kiujn ili prenas. Ankaŭ, la ĝentileco al la alparolato estas esprimata en malsamaj manieroj (8).

| | | | | |
|-----|----|----------------------|---|----------|
| (8) | a. | <i>tabe-ma'su</i> | <i>ooki'i=de'su</i> | [japana] |
| | | manĝi-ĜEN.DEK | esti.granda.DEK=KOP.ĜEN.DEK | |
| | | “manĝas” | “estas granda” (ambaŭ en ĝentila stilo) | |
| | b. | <i>tabe-ma'si-ta</i> | <i>o'oki-kaQta=de'su</i> | [japana] |
| | | manĝi-ĜEN-PRET.DEK | esti.granda-PRET.DEK=KOP.ĜEN.DEK | |
| | | “manĝis” | “estis granda” (ambaŭ en ĝentila stilo) | |

Kiel ilustrite en ekzemploj (8), por esprimi altan gradon de ĝentileco, la japana adjektivo utiligas kopulon en ĝentila formo. La uzo de kopulo estas nek norma nek normala. Pri normeco, iuj parolantoj ne akceptas la kombinaĵon de adjektivo kaj kopulo kvankam aliaj ne zorgas pri la ĝentiligo de adjektivo per kopulo. Pri normaleco, la sinsekvo de adjektivo kaj kopulo redunde esprimas la deklaran modon dum aliaj japanaj predikatoj neniam

esprimas deklarecon pli ol unu fojon. Krome, la tempo estas esprimata de adjektivo mem kaj ne de la kopulo =*de'su*, kiu ne ŝanĝas sian formon en (8a, b), dum kopulo normale ludas rolon kiel signalo de la tempo kiam ĝi estas uzata por substantivoj: =*da*, =*de'su* por ne-preterito (9a) kaj =*da't-ta*, =*de'si-ta* por preterito (9b).

- | | | | | |
|-----|----|------------------------|----------------------------------|----------|
| (9) | a. | <i>gakusei=da</i> | <i>gakusei=de'su</i> | [japana] |
| | | studento=KOP.DEK | studento=KOP.ĜEN.DEK | |
| | | "estas studento" | "estas studento" (ĝentila stilo) | |
| | b. | <i>gakusei=da't-ta</i> | <i>gakusei=de'si-ta</i> | [japana] |
| | | student=KOP-PRET.DEK | student=KOP.ĜEN-PRET.DEK | |
| | | "estis studento" | "estis studento" (ĝentila stilo) | |

Verbeca kategorio de adjektivoj en iuj lingvoj estis jam delonge kaj vaste konata (vidu Sapir 1921: 124 kaj Waringhien 1959 [1989]: 121), kaj troveblas en sufiĉe multe da lingvoj (Dixon kaj Aikhenvald 2004). Ankaŭ en la munda, la distingo inter verbo kaj adjektivo estas nur iel arbitre farita (Osada 1992: 42, 123). En tiaj lingvoj, la ĉefa kaj tipa funkcio de adjektivoj estas roli kiel predikato en frazo. Kiam adjektivo determinas substantivon en tiaj lingvoj, la sama morfologia strategio kiun verbo uzas por fariĝi epiteto estas uzata: speciala epiteta formo en la korea, kaj multifunkcia deklara formo en la japana. La verbecaj adjektivoj en la korea kaj la japana montras, ke la tipologio de vortospecoj, en kiu adjektivo estas alligita al sintaksa funkcio kiel "determinanto de substantivo" (Hengeveld kaj aliaj 2004; Jansen 2013a, 2013b) estas malfacile pravigita en ĝenerala lingvistiko (Lichtenberk 2005; Haspelmath 2012).

La ĉi-supre diskutitaj adjektivoj en la japana formas duone fermitan aron en tio, ke plejmulto de ili estas simpla primitiva radiko kaj ili normale ne bonvenigas novajn fremdajn kamaradojn – nome pruntovortojn. Ĉi tiu situacio ne estas tre nenormala ĉar derivaj adjektivoj estas malpli ofte trovitaj ol derivaj verboj en lingvoj en la mondo (Haspelmath kaj Sims 2010: 89). Tamen, evidente japanaj adjektivoj nombre malmultas kompare kun aliaj ĉefaj vortospecoj en la japana, kaj ilia proporcio al la tuta vortoprovizo estas pli malgranda ol en Esperanto. Komparu japanajn adjektivojn, kiuj okupas nur malpli ol 2% el la tuto de vortoj listigitaj en tezaŭro (10a) kaj en vortaro (10b) kun esperantaj adjektivoj, kiuj okupas pli ol 13% el la tuto de vortoj en vortaro de simila skalo (11).

(10) Proporcio de adjektivoj al la tuta vortoprovizo en la japana (adjektivoj/ĉiuj vortoj)

a. $590 / 32\ 600 = 1,81\%$ – *Bunruigoihyo* 1964 (Tamamura 1975)

b. $537 / 40\ 393 = 1,33\%$ – *Reikai Kokugo Ziten* 1956 (Morita 1980)

(11) Proporcio de adjektivoj al la tuta vortoprovizo en Esperanto (adjektivoj/ĉiuj vortoj)⁸

$5\ 187 / 37\ 951 = 13,67\%$ – *Praktika Esperanto-Japana Vortareto* (2022)

2.3 Pluraj vortospecoj por adjektivecaj vortoj

Krom verbecaj adjektivoj, ekzistas grupo de vortoj en la japana, kies membroj semantike respondas al esperantaj adjektivoj, sed kondukas substantivece en tio, ke ili bezonas kopulon por formi predikaton kaj postulas postpozicion por determini substantivon. Al ĉi tiu grupo apartenas vortoj kiel *kyodai* “giganta”, *hure’ssyu* “freŝa”, *ki’rei* “pura, bela, neta”, *makku’ro* “nigrega”, *yawara’ka* “mola”, *sumi’yaka* “tuja, senprokrasta”. Ĉi-subaj ekzemploj en (12) ilustras la uzon de substantivecaj adjektivoj kun la kopulo kiel predikato.

(12) a. *ki’rei=da* *ki’rei=de’su* [japana]

pura=KOP.DEK pura=KOP.ĜEN.DEK

“estas pura” “estas pura” (ĝentila stilo)

b. *ki’rei=da’t-ta* *ki’rei=de’si-ta* [japana]

pura=KOP-PRET.DEK pura=KOP.ĜEN-PRET.DEK

“estis pura” “estis pura” (ĝentila stilo)

Facile videbla estas paralelo inter uzoj de substantivo (9) kaj substantiveca adjektivo (12) sekvataj de kopulo. Sed substantivecaj adjektivoj ne kondukas perfekte samkiel substantivoj, ekzemple kiam ili estas uzataj kiel epitetoj. La japana kopulo =*da* (en nepreterita tempo), ne samkiel aliaj veraj verboj, ne uzatas por epiteto.⁹ La genitiva postpozicio estas uzata kiam substantivo fariĝas epiteto (13a) kaj la speciala epiteta postpozicio estas uzata kiam substantiveca adjektivo fariĝas epiteto (14a), dum la kopulo en preterita formo (=da’tta) estas uzata senŝanĝe kaj en deklara funkcio (9b, 12b) kaj en epiteta funkcio (13b, 14b).

8 El la esprimoj listigitaj en *Praktika Vortareto de Esperanto* 1.81, nur unuvortaj esprimoj estas kalkulitaj.

9 La japana havas alian kompleksan kopulon =*de a’ru* (=kiel ekzisti) “esti”, kiu estas stile pli formala, kaj ĝi estas uzbla kaj por predikato kaj por epiteto, sed la uzo de =*de a’ru* por epiteto (*ki’rei=de a’ru mizu* “pura akvo”) estas tro peza kiel normala lingvaĵo.

- (13) a. *gakusei=no Yamada-kUN* [japana]
 studento=^{ĜEN} PN-sinjoro
 “s-ro Yamada, kiu estas studento”
- b. *gakusei=da't-ta Yamada-kUN* [japana]
 studento=^{KOP-PRET.DEK} PN-sinjoro
 “s-ro Yamada, kiu estis studento”
- (14) a. *ki'rei=na mizu* [japana]
 pura=^{EPIT} akvo
 “pura akvo”
- b. *ki'rei=da't-ta mizu* [japana]
 pura=^{KOP-PRET.DEK} akvo
 “akvo, kiu estis pura”

Kelkaj radikaloj estas uzataj kaj kiel substantivecaj adjektivoj kaj kiel normalaj substantivoj.¹⁰ La diferenco en la statuso pri vortospeco montriĝas kiam tia radikalo staras kiel epiteto ĉar substantivoj ne povas preni la epitetan postpozicion (15).

- (15) a. *kenkoo=na hito'* [japana]
 sana=^{EPIT} homo
 “sana homo”
- b. *kenkoo=no mondai* [japana]
 sana=^{GEN} problemo
 “san-problemo, problemo de/pri sano”

Kelkaj radikaloj kiuj signifas kvaliton estas uzataj kaj kiel verbecaj adjektivoj kaj kiel substantivecaj adjektivoj (Miyajima 1965; Morita 1980). Ekzemple, la radikalo *yawara'ka* “mola” estas uzata kiel verbeca adjektivo en (16a) kaj kiel substantiveca adjektivo en (16b).

- (16) a. *yawaraka'i* [japana]
 mola.esti=^{DEK}
 “estas mola, mola”
- b. *yawara'ka=na yawara'ka=da* [japana]
 mola=^{EPIT} mola=^{KOP.DEK}
 “mola” “estas mola”

¹⁰ La afero estas ege simpligita ĉi tie. Vidu Miyajima (1965), Muraki (2022) kaj Tanomura (2002) pri pli da diskutoj.

Tiel, substantivecaj adjektivoj en la japana tre similas al substantivoj, sed ili montras ankaŭ diferencon disde substantivoj (15) kaj afinecon al adjektivoj (16). Iuj emfazas substantivecon de ĉi tiuj vortoj kaj ne aprobas apartan vortospecon por ili (Tokieda 1978), dum aliaj preferas terminon *na*-adjektivoj (Yamasaki 2000) akcentante semantikan similecon al adjektivoj. La lerneja gramatiko en Japanio adoptis la opinion de Hashimoto (1948: 98–130), ke ili formas apartan vortospecon nomatan *keiyoodo'osi*,¹¹ sed lingvistoj ofte metas la koncernajn vortojn en la meza loko inter substantivoj kaj adjektivoj, nomante ilin substantivaj adjektivoj (Teramura 1982) aŭ adjektivaj substantivoj (Martin 1992; Kageyama 1993).

Substantivecaj adjektivoj en la japana estas iusence duarangaj ĉar pli bazaj vortoj troviĝas en la unua kategorio de japanaj adjektivoj, kiuj estas verbecaj. Tamen, la duaj adjektivoj nombre superas la unuajn verbecajn ĉar, male al verbecaj adjektivoj, vortoj de la dua klaso de adjektivoj inkluzivas pruntvortojn ĉindevenajn (17a) kaj angladevenajn (17b), aldone al vortoj derivitaj per la produktiva sufikso *-teki* (*-eca*) (17c).

- (17) a. *bi'Nboo(=na)* malriĉa, *daita'N(=na)* aŭdaca, *kenkoo(=na)* sana, *ki'rei(=na)* pura, bela, neta *siNSEN(=na)* freŝa [japana]
- b. *ekizoti'kku(=na)* ekzotika, *gurote'suku(=na)* groteska, *hure'ssyu(=na)* freŝa, *ka'rahuru(=na)* bunta, *zyu'usii(=na)* suka [japana]
- c. *baatari-teki(=na)* senpripense decidita, *ningen-teki(=na)* homa/homeca, *gengo-teki(=na)* lingva/lingveca, *kokusai-teki(=na)* internacia, *koperunikusu-teki(=na)* kopernika, *kenkoo-teki(=na)* saneca [japana]

En la korea, adjektivoj rezultas el tradukoj de ekzemploj en (17a, b), kaj tio parte klarigas kial la korea havas pli da adjektivoj ol la japana. Rilate al (17c), la respondaj tradukoj en la korea ne estas veraj adjektivoj. Iuj lingvistoj opinias, ke ankaŭ en la korea la koncernaj vortoj formas alian etan klason de adjektivecaj vortoj aldone al veraj adjektivoj, sed ili rigardas ĝin kiel subklason de substantivoj. Ĉi tiu subklaso estas sintakse distingebla de ceteraj substantivoj (Kim 2002; Mok 2011; Kim 2017). Plejmulto de adjektivecaj substantivoj en la korea havas la sufikson *-cek* kaj respondas al japanaj esprimoj kun la sufikso *-teki* (vidu 17c). Historie, ĉi tiuj esprimoj sufiksitaĵ de la ĉindevena morfemo *-teki* establiĝis en la japana por traduki anglalingvaj adjektivojn kiel *systematic*, parte utiligante la fonetikan similecon inter *-teki* kaj *-tic* (Otsuki 1902: 282–283). Koreaj esprimoj plej

11 La rekta traduko de *keiyoodo'osi* estus “adjektivaj verboj”. Hashimoto (1948) rigardas kopulon kaj postpozicion, kiuj sekvas ilin, kiel finaĵojn.

verŝajne estas paŭsoj (traduk-pruntoj) de japanaj esprimoj, kiuj abundas aparte en ĉindevenaj esprimoj. Substantivecaj adjektivoj aŭ adjektivecaj substantivoj kaj en la japana kaj en la korea, do, parte originas el okcidentaj lingvoj, sed ili ne estas tiel substantivecaj kiel tiuj en Esperanto en tio ke ili neniam memstare funkcias kiel komplemento en frazo¹² (Muraki 2002; Mok 2011).

Tamamura (1975) montris, ke japanaj duaj adjektivoj registritaj en la tezaŭro *Bunruigoihyoo* nombre pli-ol-duoblas unuajn adjektivojn (1241/590), sed la sumo de adjektivoj de ambaŭ specoj (1831) atingas nur 5,61% de la tuta vortoprovizo; tio estas, la proporcio ankoraŭ restas duono kompare kun tiu de Esperanto. Do, necesas plu esplori kial Esperanto havas abundon da adjektivoj. Tamen, dume, mi volas turni rigardon al du novgvineaj lingvoj por montri, ke lingvoj povas kontentigi sin per multe malpli da adjektivoj.

2.4 Dom

Dom estas unu el la papuaj lingvoj de Papuo-Novgvineo, parolata en parto de la montara provinco Simbu (Tida 2006). Adjektivoj en Dom estas difineblaj kiel senŝanĝaj vortoj, kiuj povas okupi kelkajn sintaksajn lokojn, kiuj inkluzivas lokon ĝuste post substantivo por determinanta adjektivo (Tida 2006: 57). Do, epiteta adjektivo sekvas determinaton (18a) kaj per tiu fakto ĝi estas distingebla de epiteta substantivo, kiu antaŭas determinaton (18b). En ambaŭ kazoj, epiteto rekte determinas substantivon sen ŝanĝo en vortformo. Do, ankoraŭfoje, ni povas certi, ke rekta determinado ne estas karakteriza trajto de adjektivoj en iuj lingvoj.

(18) a. [^]yal [^]arwai [Dom]

viro longa
“altastatura viro”

b. [^]yal [^]bola [Dom]

viro porko
“vira porko (virporko)”

Ĉi-supre videblas ke epiteta substantivo foje funkcias semantike kiel esperanta adjektivo (18b). Krom kelkaj sintaksaj kondutoj, adjektivoj en Dom estas substantivecaj en tio, ke ili povas stari kiel komplemento en frazo (19).

12 Japanaj vortoj *-teki*-sufiksitaĵoj kaj koreaj vortoj *-cek*-sufiksitaĵoj ambaŭ iom similas al esperantaj adjektivoj per tio, ke ili fojfoje rekte determinas substantivon sen markilo de epiteteco, sed eble ne taŭgas pli detaligi ĉi tie.

- (19) [^]bl [^]to [Dom]
 granda doni.IMP
 “donu la grandan (al li)”

Inter Dom-aj adjektivoj, ni trovas vortojn kiel [^]bl “granda”, [^]kui “nova”, [^]wai “bona”, kaj [^]kama “nigra”, sed ne estas vortoj por “mola”, “rapida”, kaj “saĝa”. Dekoj da adjektivoj estis identigitaj. Tio signifas, ke la nombro de adjektivoj en Dom estas signife pli malgranda ol la japana sed pli granda ol iuj papuaj lingvoj kiel Hua (Haiman 1980: 268–269), Yimas (Foley 1991: 93–101), kaj Manambu (Aikhenvald 2008: 91–100), por nur listigi bone priskribitajn lingvojn. Adjektivecaj vortoj en Dom iom multas ankaŭ en tio ke demonstrativoj kaj numeraloj povas esti rigardataj kiel subklasoj de adjektivoj ĉar ili povas rekte determini substantivojn, kiuj antaŭas ilin, kaj ke ankaŭ aliaj sintaksaj lokoj okupitaj de adjektivoj akceptas demonstrativojn kaj numeralojn. Ĉar adjektivoj en Dom ne havas apartan morfologiaĵon, identaj sintaksaj kondutoj sufiĉe montras, ke ili konsistigas unu superkategorion kun demonstrativoj kaj numeraloj. Ĉi tie ni vidas interesan kontraston inter Dom kaj Esperanto. En Esperanto demonstrativoj kaj numeraloj sintakse povas rekte determini substantivojn kiel en Dom, sed morfologia simileco estas nur parta pri demonstrativoj (*tiu, tiun, tiuj, tiujn*) kaj nenia pri bazaj numeraloj (*unu, du, tri* ...). Nur vicordaj numeraloj, kiuj ne troveblas en tradicia Dom, estas en Esperanto plene adjektivecaj (*unua, unuan, unuaj, unuajn*).

Adjektivoj kaj verboj en Dom konsistigas tute fermitan klason, en kiun estas akceptita neniuj novuloj: neniuj derivaĵoj, neniuj kunmetaĵoj, neniuj pruntaĵoj. Unu koncepto adjektiveca por Esperanto estas esprimita per verbo en Dom (20).

- (20) *_dr-gwe* [Dom]
 esti.flava-3SG.DEK
 “(ĝi) estas flava”¹³

Fakte, ankaŭ verboj en Dom malmultas, nombrante nur ĉirkaŭ 150 (kp. Tida 2006: 54). Multaj konceptoj verbaj kaj adjektivaj por Esperanto estas esprimitaj per kombinoj de vortoj. Ekzemple por esprimi “estas verda” Dom kutime uzas idiomajn kiu konsistas el kvar vortoj (21).

13 Pli preciza traduko estus “estas/estis flava, flaviĝas/flaviĝis” ĉar la verbo estas en nefutura tempo kaj ĝi semantike varias inter ŝanĝo kaj stato. Ĝenerale verboj en Dom strikte distingas tempon futuran kaj nefuturan sed ili mem ne estas semantike specifitaj pri distingo de ŝanĝo kaj stato. Jen alia ekzemplo.

- (i) [^]molgwe [Dom]
 esti-3sg.dek
 “estas/estis, naskiĝas/naskiĝis”

- (21) $\sim er$ $\wedge ari$ $\wedge gari$ $\wedge kolgwe$ [Dom]
 arbo folio korpo havi(korpon)-3SG.DEK
 “(ĝi) estas verda” (havas korpon=koloron de arba folio)

Iuj vortoj estas preskaŭ ĉiam uzataj kun specifa verbo en leksika kombino por formi predikaton. Ni nomu ilin predikataj kunuloj.¹⁴ Predikata kunulo en Dom ŝajnas havi plenan semantikan enhavon dum verbo uzata kun ĝi ne semantike kontribuas al la tuta sintagmo. Tiel, la verbo, kiu kunlaboras kun predikata kunulo funkcias kiel “malpeza verbo” aŭ portanto de verba konjugacio sen konkreta signifo (22).

- (22) a. $\sim muku$ $\wedge du-gwe$ [Dom]
 rapidi(PK) ssv(diri)-3SG.DEK
 “rapidas, kuras”
- b. $_ tek$ $\wedge to-gwe$ [Dom]
 apogi(PK) ssv(doni)-3SG.DEK
 “apogas”
- c. $_ sul$ $\wedge do-gwe$ [Dom]
 sarki(PK) ssv(bruli)-3SG.DEK
 “sarkas”
- ĉ. $_ bike$ $\wedge su-gwe$ [Dom]
 lavi(PK) ssv(bati)-3SG.DEK
 “lavas”

Inter tiaj kombinoj kun sama repertuaro de malpezaj verboj estas esprimoj, kiuj respondas al esperantaj adjektivoj laŭ sia signifo (23).

- (23) a. $\sim ura$ $\wedge du-gwe$ [Dom]
 mola(PK) ssv(diri)-3SG.DEK
 “estas mola”
- b. $_ eri$ $\wedge to-gwe$ [Dom]
 dika(PK) ssv(doni)-3SG.DEK
 “estas dika”
- c. $\wedge ipn$ $\wedge do-gwe$ [Dom]
 peza(PK) ssv(bruli)-3SG.DEK
 “estas peza”

14 Fakuloj pri papuaj lingvoj nomas tian vorton adjunkto (*adjunct*) (Foley: 1986: 127–128) dum en la literaturo pri aŭstraliaj lingvoj la sama klaso de vortoj estas menciata kiel kun-verbo (*coverb*) (Dixon: 2002: 409–416). La fenomeno, do, estas iugrade konata al ĝenerala lingvistiko sen establita termino.

ĉ. ~*mre* [^]*su-gwe* [Dom]
 profunda(PK) ssv(bati)-3SG.DEK
 “estas profunda”

Unuvorte, Dom havas malmulte da adjektivoj kaj plejmulto de tio kion Esperanto esprimas per adjektivoj estas ne-unuvortaj predikataj idiomaĵoj.

2.5 Tokpisino

Vortospecoj en tokpisina gramatiko estas malfacile identigeblaj parte pro ĝia izolanta naturo. En moderna Tokpisino, plej ofte epiteto antaŭas determinatan substantivon. Mi traktos nur tiujn epitetajn vortojn, kiuj antaŭas determinaton ĉar ni trovas ĉi tie unu el la plej malfacilaj partoj de tokpisina gramatiko. Iuj lingvistoj argumentas, ke Tokpisino havas nenium adjektivon (Faraclas 1990, 2003; Verhaar 1995). Laŭ ilia vidpunkto, tiuj vortoj, kiuj esprimas kvaliton, estas substantivoj, kaj ilia argumento estas tre konvinka kun bonaj materialoj tokpisinaj kaj subtavollingvaj. Ilia datumo plejparte kongruas kun la mia, kaj subtila diferenco ŝajne temas nur pri dialektaj variaĵoj. Sed la faktoj, kiujn ili mem montris pri morfologio de vortoj kun adjektiveca semantiko sugestas almenaŭ subklason de substantivoj, kiuj ĉiam havas la sufikson *-pela* kiam ili funkcias kiel ne-predikativo, nome, epiteto aŭ komplemento.

Kelkaj epitetaj vortoj sufiksataj de *-pela* devas ŝanĝi sin en sensufiksitan formon kiam uzataj predikative. En (24a) la epiteta vorto *hotpela* (varma) havas la sufikson sed ĝi perdas la sufikson kiam uzata predikative en (24b).

(24) a. *hotpela samting* [Tokpisino]
 varma aĵo
 “varma aĵo”

b. *dispela samting em hot* [Tokpisino]
 tiu aĵo ĝi varma
 “tio estas varma”

Jen mallonga listo de tiaj vortoj.

(25) *hotpela/hot isipela/isi stretpela/stret strongpela/strong* [Tokpisino]
 varma facila prava malmola

Kelkaj aliaj perdas la sufikson nur nedevige kiam ili estas predikativoj (26, 27).

- (26) a. *klinpela samting* [Tokpisino]
 pura aĵo
 “pura aĵo”
- b. *dispela samting em klin(pela)* [Tokpisino]
 tiu aĵo ĝi pura
 “tio estas pura”
- (27) *klin(pela) nais(pela) blek(pela) smat(pela) kol(pela)* [Tokpisino]
 pura belega nigra saĝa malvarma

Ankoraŭ aliaj vortoj konstante tenas siajn formojn kun la sufikso, sendepende ĉu ili determinas substantivon, ĉu ili estas uzataj kiel predikativo (28, 29).

- (28) a. *gutpela samting* [Tokpisino]
 bona aĵo
 “bona aĵo”
- b. *dispela samting em gutpela* [Tokpisino]
 tiu aĵo ĝi bona
 “tio estas bona”
- (29) *gutpela bikpela longpela nupela olupela* [Tokpisino]
 bona granda longa nov malnova

Kvankam la sufikso *-pela* algluiĝas nur al kelkaj radikaloj, ĝi verŝajne estas gramatika elemento ĉar determina rilato kondiĉas ĝian aperon, kiel montrite ĉi-supre, kaj ankaŭ pro la fakto ke en kunmetaĵoj, la sufikso *-pela* ne aperas (30).

- (30) a. *bik-man bik-nait bik-maus* [Tokpisino]
 granda-viro granda-nokto granda-buŝo
 “tribestro” “noktomezo” “kriegi”
- b. *long-we long-taim* [Tokpisino]
 longa-vojo longa-tempo
 “malproksime” “longe”

La apero kaj malapero de la sufikso *-pela*, do, dependas de gramatikaj kuntekstoj kaj ankaŭ de subgrupoj de radikaloj. Tokpisiaj epitetaj vortoj sufiksitaĵoj de *-pela* nombras dekojn, kiuj inkluzivas vortojn kiel *bikpela* “granda”, *nupela* “nova”, *gutpela* “bona”, *blek(pela)* “nigra”, *smat(pela)* “saĝa”, sed ne la vortojn por “mola” (*malomalo*), kaj “rapida” (*spit, hariap*). Eĉ se ni nomas adjektivoj ĉi tiujn subklasojn de substantivoj, Tokpisino havas multe malpli da adjektivoj ol Esperanto.

Nun, pro la celo de komparo kun Esperanto, la konduto, kiun numeraloj montras, estas interesa ĉar Tokpisino algluas la sufikson *-pela* al iaspecaj numeraloj kiel adjektivoj. Numeraloj en Tokpisino havas simplan formon kiam oni nombras ion, ekzemple montrante per fingro (31a), kiam oni uzas numeralojn kun vorto por unuo (31b), kaj oni esprimas vicordon anstataŭ nombron (31c, ĉ) kiel ĉi-sube.

- (31) a. *wan tu tri po...* [Tokpisino]
 unu du tri kvar
- b. *wan mita tu mita tri mita po mita...* [Tokpisino]
 unu metro du metroj tri metroj kvar metroj
- c. *namba wan namba tu namba tri namba po* [Tokpisino]
 numero unu numero du numero tri numero kvar
- ĉ. *wan mun tu mun tri mun po mun ...* [Tokpisino]
 unua monato dua monato tria monato kvara monato
 januaro februaro marto aprilo
 (monato unu)

Sed se temas pri nombro, numeraloj ĉiam havas la sufikson *-pela* (32a, b).

- (32) a. *wanpela tupela tripela popela ...* [Tokpisino]
 unu du tri kvar
- b. *wanpela meri tupela meri tripela meri popela meri ..* [Tokpisino]
 unu virino du virinoj tri virinoj kvar virinoj

Do la situacio en Tokpisino estas iom inversa kompare kun Esperanto, en kiu numeralo ricevas *-a*-finaĵon nur kiam ĝi esprimas vicordon dum numeraloj por nombro restas bazaj. Kvankam ne ĉiuj lingvoj distingas inter nombraj (aŭ “bazaj”) numeraloj kaj vicordaj numeraloj, kiam lingvoj distingas la du numeralojn, multaj utiligas specialajn numeralojn aŭ specialajn formojn de numeraloj por vicordo surbaze de nombraj numeraloj (Yasugi 1990). Adjektivigo de numeraloj por vicordo en Esperanto estas rigardata kiel specialigo de nombraj vortoj. Sed ĝi restas mistera ĉar “bazaj” numeraloj en Esperanto, malgraŭ ilia morfologia ne-adjektiveco, sintakse povas rekte determini substantivojn simile al adjektivoj, kaj foje ankaŭ al “bazaj” numeraloj vicorda semantiko aplikiĝas en sintagmo kun la ordo substantivo-numeralo (*numero unu, volumo du*).

3 Esperantaj adjektivoj

En Esperanto ekzistas derivitaj adjektivoj, kiuj ne esprimas kvaliton. Krom

adjektiva formo de participoj, adjektiva formo estas aplikata al “posedaj pronomoj” kaj al epitetoj, kiuj esprimas rilaton. Ĉi tiujn lastajn du specojn de adjektivoj ni esploru en ĉi tiu sekcio.

3.1 Posedaj adjektivoj

Laŭ Corbett (1987), en la suprasoraba lingvo propra nomo povas esti adjektivigita por fariĝi epiteto, kiu montras posedanton. Ekzemploj en (33) ilustras (a) uzon de poseda adjektivo, (b) uzon de genitiva formo de substantivo, kiu ne estas ĉiam natura, kaj (c) uzon de prepozicio por poseda rilato, kiu sonas germanece (Corbett 1987).

- (33) a. *Jan-ow-a kniha* (Corbett 1987) [suprasoraba]
 Jan-ADJ-FEM.SG libro.FEM.SG.NOM
 “Libro de Jan” (laŭvorte: Jana libro)
- b. *?kniha Jan-a* (Corbett 1987) [suprasoraba]
 libro.FEM.SG.NOM Jan-SG.GEN
 “Libro de Jan” (laŭvorte: libro Jan-es) esprimo akceptebla
 depende de fokuso kaj stilo
- c. *kniha wot Jan-a* (Corbett 1987) [suprasoraba]
 libro.FEM.SG.NOM de Jan-SG.GEN
 “Libro de Jan” germaneca esprimo

Kiel jam videbla en la ĉi-supraj ekzemploj, posedanto povas esti esprimata en almenaŭ tri manieroj: poseda adjektivo, substantivo en la genitiva kazo, kaj prepozicia sintagmo. Esperanto uzas ĉiujn rimedojn por indiki posedan rilaton, sed ne uzas ĉiujn por ĉiaj vortoj. Nome, prepozicia strategio estas uzata por substantivoj inkluzive de propraj nomoj (34a), genitivo por niaj tabelvortoj (34b), kaj poseda adjektivo por pronomoj (34c).

- (34) a. *de Johano, de la doktoro, de multaj esperantistoj*
 b. *ties, ies, nenies, kies, ĉies*
 c. *mia, nia, via, lia, ŝia, ĝia, ilia*

Ĉi tiu situacio aspektas “neregula” por la parolantoj de lingvoj, kiuj havas unusolan strategion por esprimi posedanton (Huziwara 2019). Esperanto ja ne atingis la nivelon de reguleco, kiu montriĝas en la ĉi-subaj ekzemploj. En la korea, la regulo estas uzi genitivan postpozicion (35) kvankam por kelkaj pronomoj troviĝas kunfandiĝinta versio de pronomo plus partikulo (35c).

- (35) a. *Chelswu=uy* [korea]
 Chelswu=GEN
 “de Chelswu”
- b. *ikes=uy* [korea]
 tio=GEN
 “ties, de tio”
- c. *na=uy ~ nay* [korea]
 mi=GEN ~ mi.GEN
 “mia, de mi”

En la japana, regule aperas genitiva partikulo (36).

- (36) a. *Ta'roo=no* [japana]
 Taro=GEN
 “de Taro”
- b. *kore=no* [japana]
 tio=GEN
 “ties (de tio)”
- c. *watasi=no* [japana]
 mi=GEN
 “mia (de mi)”

En Dom, posedanto ricevas neniun signon kaj aperas ĝuste antaŭ posedajo (37) samkiel aliaj specoj de substantiva epiteto, kiuj ne ŝanĝite nur antaŭas determinaton¹⁵.

- (37) a. [^]*Glmai* _{_}*kal* [Dom]
 Glmai aĵo
 “aĵo de Glmai”
- b. [^]*yal* [^]*i* _{_}*kal* [Dom]
 viro tiu aĵo
 “aĵo de tiu viro”
- c. *~na* _{_}*kal* [Dom]
 mi aĵo
 “mia aĵo (aĵo de mi)”

¹⁵ Esprimoj pri posedajo foje ricevas gramatikan signon en Dom. Vidu Tida (2002, 2006) pri detaloj de la posedaj esprimoj en Dom.

En Tokpisino, oni ĉiam uzas prepozicion *bilong* por ĉiuspecaj esprimoj por posedanto (38).

- (38) a. *bilong Jon* [Tokpisino]
 de Jon
 b. *bilong dispela* [Tokpisino]
 de tio
 c. *bilong mi* [Tokpisino]
 de mi
 “mia (de mi)”

En neniu el la kvar lingvoj, posedantoj esprimiĝas per adjektivigitaj aŭ adjektivecaj formoj, kontraste al Esperanto. La posedaj adjektivoj en Esperanto deriviĝas nur de personaj pronomoj. Tamen, ili kontribuas al la adjektiveca aspekto de la lingvo ĉar ĉiuj estas tiel bazaj, ke ili estas uzataj tre ofte en parolo kaj teksto.

3.2 Kvalitaj adjektivoj kaj rilataj adjektivoj

Laŭ de Saussure (1915: 11), la ideo de adjektivo en Esperanto koncernas econ kaj rilaton. Kvankam li ĉefe traktis la adjektivigon, kiu rezultigas esprimon por eco, li montris, ke la vorto *homa*, kiu povas esti semantika ekvivalento de *homeca* (1915: 17) ankaŭ povas signifi “kiu rilatas al homo” (1915: 28–29). Li evidente sciis, ke iuj adjektivoj en Esperanto estas sisteme dusencaj. Kalocsay kaj Waringhien (1938: 191) distingis inter la “kvalifikaj adjektivoj” du kategoriojn: tiuj, kiuj esprimas “individuan, esencan econ” kaj tiuj, kiuj esprimas “karakterizan cirkonstancon” kaj “devenas de substantivaj kaj adverbiaj radikoj, ofte kun prefiksoj aŭ kunmetitaĵoj” (39a). Ili rimarkis, ke adjektivoj de la ĉi-lastaj subklaso ne estas uzataj “ĉe la komparacio”. Aldone al ilia rimarko, ni diru, ke ĉi-specaj adjektivoj estas malfacile gradigeblaj ĝenerale (39b).

- (39) a. *pastra domo, subtegmenta ĉambro, porĉiama amo*
 b. *?tre/?iom/?pli pastra domo*

Kontraste al “kvalitaj adjektivoj” mi volas nomi “rilataj adjektivoj” tiujn adjektivojn ĉefe desubstantivajn¹⁶ kaj negradigeblajn, kiuj esprimas ian rilaton al sia determinato. Ĉi tiuj adjektivoj estas konataj per variaj terminoj: pseŭdoadjektivoj, nur-atributaj adjektivoj, transponitaj adjektivoj,

16 Mi ĉefe pritraktas desubstantivajn ekzemplojn en ĉi tiu artikolo, sed nomepitetoj, kiuj ne nepre estas derivitaj de substantivoj, kondutas simile al rilataj adjektivoj.

(i) *aŭstronezia (lingvofamilio), Blanka (Domo), oĥotska (maro), svahila (lingvo)*

desubstantivaj adjektivoj, nepredikantaj adjektivoj (Levi 1978: 2), kaj relativaj adjektivoj (Kolker 1985).¹⁷ La multeco de terminoj montras, ke la kampo de ĉi tiuj adjektivoj ne estis sufiĉe studata kaj ofte la koncepto mem estas malsame difinita. Rilataj adjektivoj en eŭropaj lingvoj tamen ricevis konsiderindan atenton en lastaj jardekoj (Nagano 2016). Oni kutime diras, ke rilataj adjektivoj kiel subkategorio de adjektivoj estis unuafoje eltrovita de Bally (1944) – bedaŭrinde por esperantologoj ĉar, almenaŭ laŭ mia scio, neniu lingvisto menciis la verkojn de de Saussure (1915) kaj Kalocsay kaj Waringhien (1938), kiuj antaŭas tiun de Bally.

Laŭ Kalocsay kaj Waringhien (1938: 159), diferenco inter kvalitaj adjektivoj kaj rilataj adjektivoj montriĝas ankaŭ en la alternebleco inter esprimoj adjektiva kaj prepozicia-sintagma. La enhavo de kvalita adjektivo malfacile esprimeblas per prepozicia sintagmo (40a) dum rilata adjektivo havas samsencan prepozician sintagmon (40b).

- (40) a. *blanka domo, ?domo de blanko*
 b. *antaŭdoma ĝardeno = ĝardeno antaŭ domo*¹⁸

Ĉi tiu tendenco eviti prepozician sintagmon validas verŝajne nur sub iu kondiĉo, eble de unuradikeco de epiteta esprimo, ĉar alternado de kvalita adjektivo kaj prepozicia sintagmo en la ĉi-subaj ekzemploj (41, 42).

- (41) a. *homo de granda talento = grandtalenta homo*
 b. *de (la) sama speco = samspeca*
 c. *de alta nivelo = altnivela*

- (42) *Reguloj de vortefiko = Vort-efikaj reguloj*
 (Kalocsay kaj Waringhien 1938: 42, 43)

Ĉi tie la pli bazaj esprimoj, ŝajne, estas prepoziciaj sintagmoj, surbaze de kiuj fariĝas kunmetitaj adjektivoj. Nun, ĉi-supraj faktoj parte klarigas la sekreton de abundeco de esperantaj adjektivoj. Unue, en certa kazo de kvalitaj esprimoj, Esperanto kutime kaj konstante preferas adjektivan formon (*blanka anstataŭ de blanko*). Due, en Esperanto tre produktiva estas procezo de kunmeto, kiu naskas adjektivojn. Do, eĉ se temas nur pri kvalita esprimo, adjektivoj abundas en Esperanto ĉar epiteto estas kvazaŭ destinita aperi en adjektiva formo (40a) en Esperanto (kp. (4ĉ) “de verdo” en la korea

17 La anglaj terminoj montritaj de Levi (1978) estas *pseudoadjectives*, *attributive-only adjectives*, *denominal adjectives*, *transposed adjectives* kaj *denominal nonpredicate adjectives*. La termino de Kolker (1985) aperas en lia esperanta resumo kiel traduko de la rusa esprimo *otnositel'noe prilagatel'noe* (1985: 87).

18 Kalocsay kaj Waringhien (1938: 159) ilustris la sintagmon *domo antaŭ ĝardeno*, kiu devas esti preseraro. La korektita esprimo *ĝardeno antaŭ domo* estas trovita en nova eldono (Kalocsay kaj Waringhien 1980: 55).

kaj ankaŭ stile tro peza kaj kuntekste limigita uzo de esperanta esprimo “domo, kiu blankas”).

Revenante al rilataj adjektivoj, Bally (1944: 97) opinias, ke rilataj adjektivoj ne estas uzataj predikative. Ĉi tio validas por la respondaj esperantaj adjektivoj (43).

- (43) a. ?*La rajtoj estas homaj.* (*homaj rajtoj*)
 b. ?*La malsano estas kora.* (*kora malsano*)

Eĉ se oni trovus bonan kuntekston por la ĉi-supraj esprimoj, oni kredeble ne trovus vojon interpreti la ĉi-subajn (44).

- (44) a. **La rajtoj homas.*
 b. **La malsano koras.*

La distingo inter kvalitaj adjektivoj kaj rilataj adjektivoj estas foje malfacila, sed dank'al la pluraj testoj kiel gradigebleco (39), transformebleco en ekvivalentan esprimon kun prepozicio (40), kaj predikatebleco (43, 44), ni povas determini kiuj estas kvalitaj kaj kiuj estas rilataj.

Bally (1944) traktis la koncernajn francajn adjektivojn kadre de teorio pri kunmetaĵoj, rigardante ilin kiel elementojn de kunmetaĵoj. Malmultaj ne konsentus kun li pri unuvorteco de la unuo enhavanta rilatan adjektivon, ĉar interne de la unuo okazas sintaksa procezo de akordo, kiu montras sintagmecon de la unuo. Tamen, oni povas vidi, ke en multaj okazoj rilataj adjektivoj konsistigas nomojn esprimeblajn unuvorte en iuj lingvoj, ekzemple:

- (45) *mapo* (angla: *map*) = *landkarto* (germana: *Landkarte*) = *geografia karto*
 (franca: *carte géographique*)

Inter eŭropaj lingvoj, oni diras, ke iuj preferas kunmetaĵojn dum aliaj inklina konstrui anstataŭe sintagmojn per adjektivo kaj substantivo: tio kio estas kutime esprimata en ĝermanaj lingvoj per kunmetaĵoj estas ofte esprimata en la rusa per deriva adjektivo plus substantivo (Mezhevich 2002; Corbett 2004). Mezhevich (2002) ilustras ĉi-subajn esprimojn en la angla kaj la rusa.

- (46) a. *book-store* [angla]
 libro-vendejo
 “librovendejo”
 b. *knizh-n-yj* *magazin* [rusa]
 libro-ADJ-VIR.SG vendejo(VIR.SG)
 “libra vendejo”

- (47) a. *a/the heart disease* [angla]
 NEDEF/DEF koro malsano
 “kormalsano”
- b. *serdech-n-aja bolezni* [rusa]
 koro-ADJ-IN.SG malsano(IN.SG)
 “kora malsano”

Laŭ mia observo, kompare kun averaĝaj eŭropaj lingvoj, Esperanto emas kunmeti elementojn en unu vorton (kiel ĝermanaj lingvoj) se temas pri nomi koncepton per du radikoj – tial *vaporŝipo* anstataŭ *vapora ŝipo*. Aldone al la ĉi-supraj ekzemploj, tio montras, ke laŭvortaj tradukoj de la anglaj esprimoj kongruas kun esperantaj kunmetaĵoj kutime uzataj. Sed eĉ en la kunmetema Esperanto “la paso de substantivo al adjektivo estas io tute natura kaj simpla” (Waringhien 1959 [1989]: 101) kaj adjektivoj ofte “servas por enkonduki novan koncepton kaj por difini novan terminon” (Kiselman 2016) tiel ke ne malofte ni trovas desubstantivajn adjektivojn, kiuj ne estas eĉ en PIV. Do, el tre multaj substantivoj esperantistoj povas krei tiajn adjektivojn¹⁹, kiaj tute mankas en iuj lingvoj (Hagège 2004; Nagano 2016). La manko de rilataj adjektivoj en la kvar lingvoj ĉefe pritraktataj en ĉi tiu artikolo estas parte klarigebla aŭ per verbeco de adjektivoj aŭ per malgrandeco de adjektiva kategorio en la koncernaj lingvoj. Laŭ difino bazita sur la testoj uzataj en ĉi tiu studo, lingvoj kun verbecaj adjektivoj logike ne havas rilatajn adjektivojn ĉar adjektivoj ĉefe funkcias kiel predikato en tiaj lingvoj (Hagège 2004). Ankaŭ lingvoj kun relative malgranda nombro de adjektivoj ne inkluzivas rilatajn adjektivojn en sia vortprovizo ĉar la adjektiva klaso en tiaj lingvoj enhavas nur vortojn kun plej tipe kvalita signifo en la centro de la semantika gamo por kvalitaj adjektivoj (Dixon 1977, 2004).

Ekzisto de rilataj adjektivoj karakterizas Esperanton ĉar tiaj adjektivoj ne estas universalaj, kaj troviĝas en malmulte da lingvoj. Mi kredas, ke la ĉefa fonto de abundo da adjektivoj en Esperanto estas ties povo produkti rilatajn adjektivojn. Laŭ Haspelmath kaj Sims (2010: 89), la desubstantivaj rilataj adjektivoj, kiuj formas la semantikan klason de adjektivoj plej disvolviĝintan en multaj eŭropaj lingvoj, ŝajnas ege maloftaj en aliaj partoj de la mondo. Kolker (1985), kiu emfazis la influon de la rusa sur la plano kaj

19 Kvankam ĉi tiu artikolo ne povas plene trakti la limon de rilataj adjektivoj en Esperanto, ŝajnas, ke iuj konceptoj malfacile esprimiĝas en rilataj adjektivoj en Esperanto. Ekzemple por deadjektiva substantivo *sano* ni ne tre ofte disponas pri responda rilata adjektivo ĉar la radikalo estas uzata kvalite. *La Monda Organizaĵo pri Sano* estas *san-organizo*, sed ne *sana organizo* por multaj. Alia ekzemplo estas ne tre regule derivita substantivo “unuoj”, al kiu verŝajne mankas responda rilata adjektivo. *La Sistemo Internacia de Unuoj* traktas *unuosistemon*, kaj ne la *unuoj sistemon*. Rilata adjektivo ĉi tie haltas kaj anstataŭe funkcias nur kunmetaĵo kaj prepozicia sintagma.

disvolviĝo de Esperanto, rimarkis, ke Esperanto pli produktive adjektivigas substantivojn ol la rusa, kiu siavice superas la ĝermanajn kaj latinidajn lingvojn tiurilate (1985: 87–88). Do, plej verŝajne, kiel Kolker (1985) supozis, preskaŭ-regula adjektivigo de substantivoj en Esperanto estas reguligo laŭ la ruslingva modelo, kaj Esperanto eĉ povas esti la lingvo kun la plej grandskala adjektiva vortospeco en la mondo.

Lingvoj, kiuj ne havas rilatajn adjektivojn, utiligas aliajn rimedojn por esprimi la saman ideon. En la japana, substantivo kun la genitiva partikulo (48b, 49b) ofte estas ekvivalento de esperanta adjektivo, kaj kunmetaĵo (49c, 50b) ofte havas elementon, kiu esprimeblas per esperanta adjektivo.

- (48) a. *lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj* (Manifesto de Prago 1996)
 b. *genGO=no hubyo'odoo=ya hUNSOO* [japana]
 lingvo=GEN malegaleco=kaj/aŭ konflikto
 “malegaleco kaj konflikto(j) de lingvo(j)”
- (49) a. *homa emancipiĝo* (Manifesto de Prago 1996)
 b. *nINGen=no kaihoo* [japana]
 homo=GEN emancipiĝo
 “emancipiĝo de homo(j)”
 c. *nINGen-kaihoo* [japana]
 homo-emancipiĝo
 “hom-emancipiĝo”
- (50) a. *etna(j) lingvo(j)* (Manifesto de Prago 1996)
 b. *miNZoku-go* [japana]
 etno-lingvo
 “etnolingvo(j)”

Fakte, estas disputo pri ĉu la japana havas rilatajn adjektivojn aŭ ne (kp. Bisetto 2010; Nagano 2016). Uzo de la japanaj substantivecaj adjektivoj kun la sufikso *-teki* foje ja similas al rilataj adjektivoj en Esperanto: ekzemple, en (48b) *genGO=no* estas anstataŭigebla per *genGO-teki(=na)* (lingvo-ADJ=EPIT) kun almenaŭ iom da akceptebleco. Tamen, tia anstataŭigo ne ĉiam eblas: ekzemple, *nINGen-teki(=na)* (homo-ADJ=EPIT), kiu signifas “homeca”, ne povas anstataŭi *nINGen=no* en (49b). La sama problemo ekzistas pri la koreaj adjektivecaj substantivoj kun la sufikso *-cek*. Ni devas rememori, ke esprimoj sufiksitaĵoj per la japana *-teki* kaj la korea *-cek* formas substantivecajn adjektivojn aŭ adjektivecajn substantivojn, kiuj originas el traduko de okcidentaj esprimoj (kp. sekcio 2.3 de ĉi tiu artikolo). Eble iugrade, la japana kaj la korea komencis sub okcidenta influo evoluigi rilatajn adjektivojn,

kiuj nur akireblas en la adjektiveca kaj substantiveca sub-vortospeco, sed ankoraŭ nun plej ofte, en ambaŭ lingvoj kvalita signifo rezultas el la adjektivigo de vorto.

Waringhien (1989: 121) pravis kiam li diris, ke en Esperanto “oni trovas ordinare ne pli ol duelementajn kunmetaĵojn; la trielementaj jam sonas iom ĝene. [...] Tian antipation por la plurelementaj vortoj ni ŝuldas simple al la rutino de la okcidenteŭropaj lingvoj”. La japana ne hezitas kunmeti tri elementojn en unu vorton (51).

- (51) a. *se'kai-hoken-ki'kan* [japana]
 mondo-sanigo-organizo
 “La Monda Organizaĵo pri Sano”
- b. *kokusai-tani-kei* [japana]
 internaci-unuo-sistemo
 “La Sistemo Internacia de Unuoj”
- c. *hozyo-gengo-'an* [japana]
 helpo-lingvo-projekto
 “projekto de helplingvo” (Manifesto de Prago 1996)

Kiel videble en (49, 50, 51), Esperanto preferas adjektivojn kaj prepoziciajn sintagmojn ol kunmetaĵojn, kompare kun la japana. Esperanto povas fieri pri sia kunmetemo en Eŭropo sed, el la japana perspektivo, Esperanto aspektas utiligi adjektivojn por eviti kunmetaĵojn laŭ la kutimo de eŭropaj lingvoj. La konkuro ŝajnas temi pri kunmetemo kaj adjektivigemo, sed notinde estas ke Dom, kiu montras nenian adjektivigon, preskaŭ neniam kunmetas radikalojn en unu vorton (Tida 2006: 103–107).

4 Konklude

Ĉi tiu artikolo argumentis, en sekcio 2, ke estas diferencoj inter lingvoj kun substantivecaj adjektivoj kaj verbecaj adjektivoj, kaj rekte determini substantivon estas nek la universala funkcio nek la karakteriza trajto de adjektivoj en lingvoj tra la mondo. Mi montris ankaŭ, ke multaj lingvoj havas malpli multe da adjektivoj ol Esperanto. Mi traktis ne-kvalitajn adjektivojn en sekcio 3 kaj aparte atentis rilatajn adjektivojn, kies ekzisto mem karakterizas la lingvon. Ekzisto de rilataj adjektivoj en iu lingvo premisas, ke ĝia adjektiva kategorio estas substantiveca kaj grandskala tiel ke ĝi enhavas la vortojn de la tuta gamo de kvalitaj signifoj.

Adjektiva klaso estas hejmo de vortoj kun ĉefe kvalita semantiko. Esperanto multe etendas ĉi tiun landon, ricevante vizitantojn devenantajn

de diversaj specoj por doni al ili ŝancon epitetiĝi en la formo de adjektivo. En Esperanto, la regno de la adjektivo ŝajne havas monopolon super la merkato de epitetoj, kaj kvalita naturo de adjektivoj ne tiel gravas kiel en iuj lingvoj, en kiuj vorto devas havi signifon iugrade kvalitan por enlandiĝi en la adjektivan regnon. Estas tre interese vidi kiel la klaso de leksikaj elementoj estas tiel forte ligita kun la sintaksa funkcio en Esperanto, des pli, ĉar gramatika klaso de prepozicioj en la sama lingvo estas, male, saturita de riĉa semantika enhavo (Tida 2008). Ĉi tiu ekzotika situacio troviĝas en multaj eŭropaj lingvoj. Eŭropeco, kiu troviĝas en la lingva strukturo de Esperanto, ne estas sekreto por lingvistoj (Meillet 1918; Ossaka 1981; Comrie 1996; Yamasaki 2000). Esperanto heredis abundecon de adjektivoj evidente de eŭropaj lingvoj. La simbola fakto, kiu konfirmas tion, estas simpla kaj klara: ekzisto de rilataj adjektivoj en Esperanto.

Mallongigoj

| | |
|------|------------------|
| ADJ | adjektivo |
| DEK | deklara |
| DMD | demanda |
| EKK | ekkria |
| EPIT | epiteta |
| FRM | formala |
| ĜEN | ĝentila |
| IN | ina |
| KOND | kondiĉa |
| KOP | kopulo |
| LIG | ligilo |
| NEG | negativa |
| PK | predikata kunulo |
| PL | plurala |
| PN | persona nomo |
| PRĚT | preterita |
| POS | posedanto |
| SG | singulara |
| SSV | sensignifa verbo |
| T | temo |
| VIR | vira |

Dankoj

Ĉi tiu artikolo baziĝas sur prelego kiun mi faris okaze de la 43-a Esperantologia Konferenco de CED, 2021-07-22. Mi estas dankema al ĉiuj konferencorganizantoj kaj al tiuj kiuj komentis la version legitan tie. Mi ŝuldas dankon aparte al Guilherme Fians, Mark Fettes, Orlando Raola, Humphery Tonkin, kaj Giridhar Rao. De du anonimaj provlegantoj mi ricevis trafajn komentojn, kiuj multe helpis min plibonigi la artikolon.

Bibliografio

- Aikhenvald, A. (2008). *The Manambu language of East Sepik, Papua New Guinea*. Oxford: Oxford University Press.
- Bally, C. (1944). *Linguistique générale et linguistique française*. Bern: Francke Verlag.
- Bisetto, A. (2010). Relational adjectives crosslinguistically. *Lingue e Linguaggio*, 9(1), 65–85.
- Boas, F. (1938). Language. En F. Boas (Red.). *General anthropology* (p.124–145). Boston: D. C. Heath and Company.
- Choy, H-P. (1961). *Wulimalpon* [*Nia gramatiko, en la korea, unua eldono en 1929*]. Seoul: Cengum Munhwasa.
- Comrie, B. (1996). Natural and artificial international languages – a Typosogist’s Assessment. *Journal of Universal Language*, 1(1), 35–55.
- Corbett, G. G. (1987). The morphology/syntax interface: evidence from possessive adjectives in Slavonic. *Language*, 63(2), 299–345.
- Corbett, G. G. (2004). The Russian adjective: A pervasive yet elusive category. En R. M. W. Dixon, & A. Y. Aikhenvald (Red.). *Adjective classes: A cross-linguistic typology* (p.199–222). Oxford: Oxford University Press.
- Dixon, R. M. W. (1977). Where have all the adjectives gone? *Studies in Language*, 1(1), 19–80.
- Dixon, R. M. W. (2002). *Australian languages*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Dixon, R. M. W. (2004). Adjective classes in typological perspective. En R. M. W. Dixon, & A. Y. Aikhenvald (Red.). *Adjective classes: A cross-linguistic typology* (p.1–49). Oxford: Oxford University Press.
- Dixon, R. M. W. (2010). *Basic linguistic theory, Volume 2: Grammatical topics*. Oxford: Oxford University Press.
- Dixon, R. M. W., Aikhenvald, A. Y. (Red.). (2004). *Adjective classes: A cross-linguistic typology*. Oxford: Oxford University Press.
- Elisséèv, S. (1924). La langue coréenne. En A. Meillet, & M. Cohen (Red.). *Les langues du monde* (p.255–261). Paris: Champion.

- Evans, N. (2010). *Dying words: Endangered languages and what they have to tell us*. Chichester: Wiley-Blackwell.
- Evans, N., Osada, T. (2005). Mundari: The myth of a language without word classes. *Linguistic Typology*, 9, 351–390.
- Faraclas, N. (1990). From old Guinea to Papua New Guinea: A comparative study of Nigerian Pidgin and Tok Pisin. En J. W. M. Verhaar (Red.). *Melanesian Pidgin and Tok Pisin: Proceedings of the First International Conference of Pidgins and Creoles in Melanesia* (p.91–169). Amsterdam: John Benjamins.
- Faraclas, N. (2003). The *-pela* suffix in Tok Pisin and the notion of “simplicity” in pidgin and creole languages: What happens to morphology under contact? En I. Plag (Red.). *Phonology and morphology of Creole Languages* (p.269–290). Tübingen: Nimeyer.
- Foley, W. A. (1991). *The Yimas language of New Guinea*. Stanford: Stanford University Press.
- Hagège, C. (2004). On categories, rules and interfaces in linguistics. *The Linguistic Review*, 21, 257–276.
- Haiman, J. (1980). *Hua: A Papuan language of the Eastern Highlands of New Guinea*. Amsterdam: John Benjamins.
- Hashimoto, S. (1948). *Kokugohoo Kenkyuu [Studo de japana gramatiko, en la japana]*. Tokyo: Iwanami.
- Haspelmath, M. (1994). Passive participles across languages. En B. Fox, & P. J. Hopper (Red.). *Voice: Form and function* (p.151–177). Amsterdam / Philadelphia: Benjamins.
- Haspelmath, M. (2012). Escaping ethnocentrism in the study of word-class universals. *Theoretical Linguistics*, 38(1-2), 91–102.
- Haspelmath, M., Sims, A. D. (2010). *Understanding morphology*. London: Hodder Education.
- Hengeveld, K., Rijkhoff, J., Siewierska, A. (2004). Parts-of-speech and word order. *Journal of Linguistics*, 40, 527–570.
- Hoffmann, J. (1903). *Mundari grammar*. Calcutta: The Secretariat Press.
- Huziwara, K. (2019). Esuperantogo no syoyuukei ni mirareru kisokusei to hukisokusei [Reguleco kaj nereguleco trovitaj en la poseda formo de Esperanto, en la japana]. *Gaikokugo Kyooiku no Huront'ia*, 2, 379–385.
- Jansen, W. (2013a). Esperanto parts of speech in functional discourse grammar. *Linguistics*, 51(3), 611–652.
- Jansen, W. (2013b). Radikoj kaj vortoj en esperanto. *Esperantologio/Esperanto Studies*, 6, 9–43.
- Kageyama, T. (1993). *Bunpoo to gokeisei [Gramatiko kaj vortfarado, en la japana]*. Tokyo: Hituzi.
- Kalocsay, K., Waringhien, G. (1938). *Plena gramatiko de Esperanto*. Budapest: Literatura Mondo.

- Kalocsay, K., Waringhien, G. (1980). *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Kim, K-h. (2017). 'I' uy hyengyongsasel ey tayhan caykochal: 'Phasayngmyengsa (N+cek)+ita' uy pucenghyeng punsek ul cwungsim ulo. [Reekzameno de 'i' kiel adjektivo: Fokusante pri la negativa formo de la deriva substantivo (N+cek)+ita, en la korea]. *Ene*, 3, 1-23.
- Kim, S. (2002). "-cek"-hyeng uy thongsacek pemcwu wa uymi [Sintaksa kategorio kaj semantiko de "-cek"-formo, en la korea]. *Kwanak Emun Yenkwu*, 27, 207-223.
- Kiselman, C. (2016). Lingva riĉo kaj la postuloj de la terminologio. En F. Gobbo (Red.). *Lingua, politica, cultura. Serta gratulatoria in honorem Renato Corsetti* (p.125-135). New York: Mondial.
- Kolker, B. (1985). *Vklad ruskogo jazyka v formirovanie i razvitie esperanto*. Doktoriĝa disertaĵo. Moskva: Akademija nauk SSSR.
- Levi, J. N. (1978). *The syntax and semantics of complex nominals*. New York: Academic Press.
- Lichtenberk, F. (2005). On the notion "adjective" in Toqabaqita. *Oceanic Linguistics*, 44(1), 113-144.
- Martin, S. E. (1992). *A reference grammar of Korean*. Tokyo: Tuttle.
- Meillet, A. (1918). *Les langues dans l'Europe nouvelle*. Paris: Payot.
- Mezhevich, I. (2002). English compounds and Russian relational adjectives. En G. S. Morrison, & L. Zsoldos (Red.). *Proceedings of the North West Linguistics Conference 2002* (p.95-114). Burnaby: Simon Fraser University Linguistics Graduate Student Association.
- Miyajima, T. (1965). Ikutuka no bunpooteki ruigi hyoogen ni tuite [Pri kelkaj gramatikaj esprimoj sinonimaj, en la japana]. *Kotoba no Kenkyuu*, 2, 75-106.
- Mok, J. (2011). Hankwuke myengsaseng hyengyongsa tane pulyu uy cenglip: Ku yuhyenglon kwa pusa phasayng [La koreaj substantivecaj adjektivoj: Ilia tipologio kaj adverba derivado, en la korea]. *Enehak*, 61, 131-159.
- Morita, Y. (1980). Nihongo no keiyoosi ni tuite [Pri adjektivoj de la japana, en la japana]. *Koza Nihongo Kyoouiku*, 16, 108-124.
- Muraki, S. (2002). Daisan keiyoosi to sono keitairon [Triaj adjektivoj kaj ilia morfologio, en la japana]. En K. Sato (Red.). *Gendai Nihongo no Bunpo Kenkyuu* (p.211-237). Tokyo: Meiji Shoin.
- Nagano, A. (2016). Are relational adjectives possible cross-linguistically? The case of Japanese. *Word Structure*, 9(1), 42-71.
- Nam, K-s., Ko, Y-k. (1993). *Phyocwun kwuke munpeplon* [Norma gramatiko de la korea, en la korea, unua eldono en 1985]. Seoul: Thap.

- Ossaka, K. (1981). *Esuperanto zentisi ryakkai* [Malgranda monografio pri esperantaj prepozicioj, en la japana, unua eldono en 1943]. Tokyo: Japana Esperanto-Instituto.
- Otsuki, F. (1902). *Hukken Zassan* [Diversa Kolekto da Verkoj de Hukken (F. Otsuki), en la japana]. Tokyo: Kobundo.
- Praktika Esperanto-Japana Vortareto. 2022. *Praktika Esperanto-Japana Vortareto*. <https://www.vastalto.com/pejv/>
- Ramstedt, G. J. (1939). *A Korean grammar*. Helsinki: Suomalais-Ugrilaisen Seuran.
- Sapir, E. (1921). *Language: An introduction to the study of speech*. New York: Harcourt Brace.
- Saussure, R. de (1915). *Fundamentaj reguloj de la vort-teorio en Esperanto*. Bern: Lingva Komitato.
- Schachter, P., Shopen, T. (2007). Parts-of-speech systems. En T. Shopen (Red.). *Language typology and syntactic description, Volume 1: Clause structure* (p.1-60). Cambridge: Cambridge University Press.
- Shagal, K. (2017). *Towards a typology of participles*. Helsinki: Unigrafia.
- Sohn, H-m. (1999). *The Korean language*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Sohn, H-m. (2004). The adjective class in Korean. En R. M. W. Dixon, & A. Y. Aikhenvald (Red.). *Adjective classes: A cross-linguistic typology* (p.223-241). Oxford: Oxford University Press.
- Suh, C-S. (2006). *Kwuke munpep* [Gramatiko de la korea, en la korea, unua eldono en 1994]. Seoul: Jipmoondang.
- Tamamura, F. (1975). Goiron kara mita keiyoosi [Adjektivoj el la leksikologia vidpunkto, en la japana]. *Doshisha Kokubungaku*, 10, 87-104.
- Tanomura, T. (2002). Keiyoodoosi rentaikei ni okeru “na/no” sentaku no iti yoin: “yuumei na” to “mumei no” [Pri semantika faktoro en la elekto de “na/no” en keiyoodoosi: yuumei na “fama” kaj mumei no “senfama”, en la japana]. *Keiryoo Kokugogaku*, 23(4), 207-213.
- Teramura, H. (1982). *Nihongo no sintakusu to imi, I* [Sintakso kaj senco en la japana, Volumo I, en la japana]. Tokyo: Kurosio.
- Tida, S. (2002). Domugo no Syoyuu wo Arawasu Hyoogen [Posedaj esprimoj en Dom, en la japana]. *Kyoto Daigaku Gengogaku Kenkyuu*, 21, 337-367.
- Tida, S. (2006). *A grammar of the Dom language*. Doktoriga disertaĵo. Kyoto: Kyoto University.
- Tida, S. (2008). Kial multas lokaj adpozicioj en Esperanto? Komparo kun la japana, Tok-pisino, Dom kaj aliaj lingvoj. En U. Lins (Red.). *Aziaj kontribuoj al esperantologio: Aktoj de la 30-a Esperantologia Konferenco, Johamo 2007* (p.20-32). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

- Tida, S. (2020). Nihongo no doosi no gokan to akusento ni kansuru oboegaki [Noto pri verbaj radikaloj kaj akcento en la japana, en la japana]. *Ariake: Kumamoto Daigaku Gengogaku Ronsyuu*, 19, 1–32.
- Tida, S. (2022). Esuperanto no syutudoo keiyoosi no doosi katuyoo o megutte [Pri deverbaj adjektivoj konjugaciigantaj kiel verboj en Esperanto, en la japana]. *Ariake: Kumamoto Daigaku Gengogaku Ronsyuu*, 21, 1–28.
- Tokieda, M. (1978). *Nihonbunpoo Koogohen [Japana gramatiko: Parola lingvo, en la japana, unua eldono en 1950]*. Tokyo: Iwanami.
- Vendryes, J. (1921). *Le Langage*. Paris: Renaissance du Livre.
- Verhaar, J. W. M. (1995). *Toward a reference grammar of Tok Pisin*. *Oceanic Linguistics Special Publication* 26. Honolulu: University of Hawai'i Press.
- Waringhien, G. (1959 [1989]). *Lingvo kaj vivo*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Yamakoshi, Y. (2013). Buriyaato-go no “bunsi” no kinoo ni tuite: Kussetuteki keiyoosika to itidukerareru ka [Pri la funkcio de “participoj” en la burjata: Ĉu ni povas difini “participojn” kiel la fleksian V→A transponon?, en la japana]. *Hoppoo Gengo Kenkyuu*, 3, 25–40.
- Yamasaki, S. (2000). *Enkonduko en la japanan*. Chapecó: Fonto.
- Yasugi, Y. (1990). Tyuubeisyogo no zyosuusi [Vicordaj numeraloj en mezamerikaj indianaj lingvoj, en la japana]. *Kokuritu Minzokugaku Hakubutukan Kenkyuu Hookoku*, 15(1), 205–263.

Pri la aŭtoro

TIDA Syuntaro instruas lingvistikon en la Universitato de Kioto. Li esploras diversajn aspektojn de Dom kaj aliaj simbuaj lingvoj parolataj en la novgvinea montaro. Krom Dom, lia esplorintereso inkluzivas morfofonologion de la korea kaj de la japana, sublingvajn fenomenojn kiel maĝangan ĵargonaron, piĝin-kreolajn lingvojn, kaj gramatikajn aspektojn de Esperanto.

Retadreso: tida.syuntaro.3e@kyoto-u.ac.jp

ORCID: 0000-0002-2636-4801

About the author

TIDA Syuntaro teaches linguistics at Kyoto University. His research focusses on various aspects of Dom and other Simbu languages spoken in the New Guinea Highlands. Besides Dom, his research interests include the morphophonology of Korean and Japanese, sublanguage phenomena such as Mahjong jargon, Pidgin Creole languages, and grammatical aspects of Esperanto.

執筆者について

千田俊太郎(ちだ しゅんたらう)。京都大學(言語學)教員。主にニューギニア高地のドム語とシンブー諸語について廣く研究。その他朝鮮語・日本語の形態音韻論、麻雀ジャーゴンなどの部分言語(sublanguage)現象、ピジン・クレオール、エスペラントの文法的側面を研究テーマに含む。

Why are there many adjectives in Esperanto? A comparison with Korean, Japanese, Dom, Tok Pisin and other languages

Abstract: It is generally accepted that some languages have a large class of adjectives while others content themselves with only a small number – if any – in the same word class. In this article, an attempt is made to show the properties of adjectives in Esperanto that contribute to the abundance of adjectival words, by comparison with Korean, Japanese, Dom, Tok Pisin and other languages. Discussed are i.a.: (i) differences between verb-like adjectives and noun-like adjectives; (ii) direct modification, which is not an inherent property of adjectives in many languages; (iii) possessive pronouns that are adjectival in Esperanto, but not in other languages, and (iv) relational adjectives that are completely foreign to most languages. Esperanto productively derives different kinds of adjectives from nouns and verbs, but many languages use other strategies to encode these meanings. Finally, the author argues that the existence of a multitude of adjectives, and of relational adjectives in particular, is a characteristic feature of Esperanto, and that, as suggested in Tida (2008) with respect to adpositions, Esperanto clearly inherited this property from European languages.

Keywords: Esperanto; Adjectives; Korean language; Japanese language; Papua New Guinea.

なぜエスペラントには形容詞が多いのか： 朝鮮語、日本語、ドム語、トク・ピシンとの対照

要旨: 一般的によく知られることではあるが、形容詞の多寡は言語により大きく異なり、形容詞が品詞として認められない言語すら存在する。本論文の目的は、エスペラントに形容詞が非常に多く存在する背景となる性質について、朝鮮語、日本語、ドム語、トク・ピシン、及びその他の諸言語との比較を通じて示すことにある。(i) 動詞的な形容詞と名詞的な形容詞の示す性質の相違、(ii) 直接修飾可能性が多く言語において形容詞固有の性質ではないこと、(iii) 多くの言語と異なりエスペラントにおける所有代名詞

が形容詞的であること、(iv) ほとんどの言語で関係形容詞が全く認められないことが論じられる。エスペラントは名詞や動詞から多様な形容詞を生産的に派生させるが、多くの言語でこれに対応する表現形式は形容詞ではない。最後に、形容詞を多く有すること、とりわけ関係形容詞の存在がエスペラントを特徴づけるものであることを論じ、その淵源が、Tida (2008) に接置詞について論じたのと同様、ヨーロッパの諸言語にあることを論じる。

キーワード: エスペラント、形容詞、朝鮮語、日本語、ニューギニア